

Renaskiĝo

*La filmeto “**Renaskiĝo**” prezentas tri generaciojn de la familio de 80-jara virino el la anar-samea popolo. Ĝi rakontas la historion de diversaj epokoj el la vivo de la anar-samea lingvo, kiu estis preskaŭ malaperanta en la 1990-aj jaroj.*

Rezulte de edukiĝo en internulejo, sekve de geedziĝo kun finno kaj pro la malalta statuso de sia lingvo, kaj pro manko de subteno al ĝi, Ailâ abandonis la anar-samean por jardekoj. Ŝi parolis la finnan al siaj infanoj, kiuj tiel iĝis parto de la ‘perdita generacio’.

Tamen, kiel maljunulino, la kuraĝa Ailâ decidis revivigi sian gepatran lingvon. Tiel ŝi travivas la renaskiĝon de la anar-samea lingvo kaj kulturo en la vivo de siaj nepoj. Ailâ estas konvinkita ke la anar-samea lingvo havas futuron.

En 2009 ekzistis ĉirkaŭ 300 parolantoj de la anar-samea lingvo. Unesko listigas la anar-samean inter la lingvoj, kiuj estas en serioza danĝero.

La filmon reĝisoris Suvi Kivelä, ĵurnalistino laboranta per la anar-samea lingvo por la Finnlanda nacia publika elsendo-kompanio.

Renaskiĝo estas ankaŭ ŝia propra historio familia, ĉar ŝi estas la patrino de la nepoj de Ailâ.

LA FILMO

Ailâ

... Ni parolis la anar-samean hejme. Mia patro naskiĝis ĉi tie en Anarujo kaj mia patrino en Paksumaa. ... Poste mi geedziĝis kun finno kaj komencis labori en anar-sameaj vilaĝoj. Ne estis alia sameo laboranta tie. Do, mi devis ekparoli en la finna.

... Tiuj estis la servantinoj de Ranta-Mari. La finna lingvo aperis jam en la lernejo, kvankam mi jam sciis iomete ĝin antaŭ ol komenci la lernejon. Estis multaj finnoj laborantaj kun la boacoj, kaj ankaŭ nord-sameoj. Ne estis strato al Utsjoki kaj tial ili ofte haltis por tranokti ĉe ni, somere kaj vintre.

... Kiam mi estis en la lernejo, estis tie samea knabo kiu ne sciis la finnan lingvon. La instruisto kutimis sendi lin en la angulon de la klasĉambro, ĉar li ne povis respondi en la finna. Nu bone, kiel eblus paroli, se vi ne scias la lingvon? Se estintus permesite paroli samean en la lernejo, tiam eble ĝi ne malaperintus. Pro tio estis tiel, ke la pli junaj infanoj eĉ ne volis lerni ĝin, ĉar ja oni ne rajtis paroli ĝin.

Arto Koskinen (filo de Ailâ, patro de la infanoj, Jussa kaj Pessi)

... Tio vere neniel ŝanĝis mian vivon – ĉiukaze ĝi estis tiom fora. Aŭ, mi ne scias, estas aferoj, kiel ekz.: la maniero, kiel homoj rilatas al vi. Se vi ne parolas la samean, vi estas neniu... Tial mi ofte sentis ke eble estintus bone studi aŭ lerni ĝin.

Ailâ

Mi pensas, ke estas certe bona afero, ke la lingvo komencis revivi. Estas kiel renaskiĝo de la samea lingvo. Eĉ por mi, la lingvo estis iomete forgesita. Tiam mia amikino Elli translokiĝis apud mian domon. Kaj ni komencis denove paroli la samean unu kun la alia... Kaj tiel ĝi re-ekvivis. Kvankam la homoj kutimis diri ... « kial penadi paroli la samean lingvon, se ĉiukaze ĝi estas survoje al malapero ». Ĝi ne malaperis komplete !

Ho, mia Jussa estas tiom laca, tre laca. Ĉu vi vekiĝas ?

Kielâpiervâl - La lingvo-nesto. Anar-Samea Asocio.

(infanĝardeno por 3-6 jaruloj, uzanta la anar-samean lingvon)

Suvi Kivelä (patrino de la infanoj)

Se vi tro longe dormas, vi maltrafas la posttagmezan manĝeton Jussa, venu ĉi tien...Ni lavu viajn manojn.

Ailâ

La kompatindulo, oni eĉ ne lasas lin dormi. Venu, venu. Venu legi ĉi tiun libron kun mi. Ni sidiĝu ĉi tie. Avino levos vin.

Kion tiu ĉi 'Muumi' havas ? Ĉu vi rekonas ŝin? Estas eta 'Mu'. Historioj de la familio 'Muumi'. Rigardu tion. Jes, kiu tiu estas?

Jussa (nepo)

"Tiu".

Ailâ

Kiu tiu estas? ... (al alia infano) Ho kia urso.

Infano

Panjo vestis min...

Ailâ

Ni vidu, kion faras Pessi. Ho, mi vidas. Tio estos paska kokino. Kaj tie estas la ovoĵ.

Edukistino

Jen, Pessi, vi povas elekti.

Pessi (nepo)

Mi elektos...

Edukistino

Bonvolu preni du, tri.

Arto Koskinen (filo de Ailâ)

Pessi kreskis en samecon, en la samean mondon, pere de ***Kielâpiervâl*** (La lingvo-nesto. Aanar-Samea Asocio), ekde kiam li estis eta knabo. Certe ankaŭ avino alportis sian kontribuon nun, ĉar ŝi parolas samee kaj ŝi volas paroli al li pri aferoj. Sendube ***Kielâpiervâl*** agis sukcese kontraŭ tiu procezo de lingvomalapero.

Estas same ankaŭ en aliaj familioj. Tio inspiris mian maljunan panjon paroli la samean. Tio estas la plej grava afero. Tiel almenaŭ la infanoj havas iun denaskan parolanton, kun kiu ili povas interparoli. Kaj ŝi povas instrui la lingvon al ili. Grandan dankon, Ailâ !

Infano kaj Ailâ

Ĝis revido!

Ailâ – hejme

Nun ni alvenis ĉe avino. Ni eniru la dometon por rigardi la neĝveturilo-magazinon.

Ĉu vi envenas? ... Tie estas multaj neĝveturiloj. Ho !

Nun ni elprenos la enaĵojn de la fiŝoj. Kie vi kaptis ilin ? ...

Pessi
Nu, tie...

Ailâ
...Ĉu en la Perko Lago ?

Pessi
Jes... Ĉu tio estas la koro ?

Ailâ
Jes, tio estas ĝi.

Pessi
Tio estas vermo. Mi trovis vermon...

Ailâ
Mi supozas ke ĝi estas la vermo, kio estis sur la hoko de via fiŝkaptilo. La logaĵo kion la fiŝo mangâs...

Kompreneble, mi esperas ke ili daŭrigos paroli la samean... La anar-samea lingvo estas jam vivanta kaj pluvivos ĉar ĝi denove tiel bone re-ekvivis. Almenaŭ tiel mi sentas.

Pessi
Avinjo, kia fiŝo tiu ĉi estas?

Ailâ
Kio?

Pessi
Kio estas tiu ĉi fiŝo?

Ailâ
Estas blanka fiŝo...

Nuuvdi Ailâ (alinome : Aili Koskinen,
naskiĝinta je la 5a de decembro 1930,
estas unu el la ĉirkaŭ 300 parolantoj
de la anar-samea lingvo.

Neniam estis pli ol mil parolantoj de la anar-samea.

La uzo de la anar-samea lingvo
ek-malkreskis signife jam en la 1950-aj jaroj.
Gravaj kialoj de tio estis la edukaj internulejoj,
la finna asimila politiko,
kaj la malalta statuso de la lingvo.

Unesko listigas hodiaŭ la anar-samean
inter la serioze endanĝerigataj lingvoj.

Kielâpiervâl (La Aanar-Samea lingvo-nesto)
estis fondita en 1996.

Tiam, kiam eskzistis nur manpleno da junaj denaskaj parolantoj,
ĉiuj en du familioj.

En Kielapierval (La Anar-Samea lingvo-nesto)
pluraj infanoj revivigis sian praulan lingvon.
Inter ili estas la nepoj de Ailâ:
Pessi kaj Jussa.

**Malgraŭ la lastatempaj klopodoj pri re-vivigo,
la anar-samea lingvo bezonas specialan subtenon.
La lingvo estas la ŝlosilo al la konservado
de la malgranda unika anar-samea kulturo.**

Patrino de la infanoj, reĝisoro kaj scenaristoo: Suvi Kivelä
Filmis: Onneli Halonen
Postproduktado: Mikkal Morottaja, Joonas Saari
Muziko: Juhani Tiainen
Produktis: Säämi máttááttâskuávdâš

Referencoj :

La video : Renaskiĝo :

http://www.youtube.com/watch?v=qN2o_DCjbDs

kun angla subteksto en la filmo mem :

<http://www.youtube.com/watch?v=e0YcIkUoEhc>

Anar-samea lingvo

http://eo.wikipedia.org/wiki/Anar-samea_lingvo

Anarâŝkielâ servi (Anar-Samea Lingvo-Asocio)

http://en.wikipedia.org/wiki/Anar%C3%A2%C5%A1kiel%C3%A2_servi

UNESCO Interactive Atlas of the World's Languages in Danger (2010)

<http://www.unesco.org/culture/languages-atlas/en/atlasmap/language-id-359.html>

Originala nomo	anarâŝkielâ
Nomo de la lingvo	Inari Saami (en), saami inari (fr), saamí de Inari (es), инари-саамский (ru) anar-samea (eo, Esperanto)
Vivkapablo	Serioze en danĝero
Nombro de parolantoj	400
Takso surbaze de loka censo kaj de raportoj de kolegoj	
Loko(j)	Centro de Anarujo en Laponia Provinco
Lando aŭ regiono	Finnlando
Koordinatoj	lat: 68.8446; long: 27.2817
ISO 639-3 kodo(j)	smn

Esperantigis : [Stefano Keller](#), *Universala Esperanto-Asocio*, aŭgusto 2012